**Protokolo de la Asembleo de la Subtena Sektoro** okazinta en Rimini (IT) dum SUS 30. Kunsidtempoj: Dimanĉo, 2007-09-02, 16:00–16:20
Ĵaŭdo, 2007-09-06, 18:40–19:30, 21:00–21:50.

*1) Formalaĵoj*. La asembleo okazas laŭ la kunsidregularo. Neniu pridubas la kvorumecon. Ĉar komence neniu estrarano ĉeestas, la kunsidon malfermas OProf. Maitzen; la protokolon verkas OProf. Fössmeier. La tagordo estas tiu laŭ la kunsidregularo (1.7); dum punkto 5 oni diskutu pri rekomendo de la Senato koncerne Acta Sanmarinensia.

Ĉiuj ĉeestantoj estas subtenaj membroj kaj tial havas ĉeest- kaj voĉdonrajton. AIS Bulgario estas reprezentata de OProf. Quednau, TAKIS de OProf. Poláková.

*2) Ĝenerala raporto.* ADoc. Dr. Macko, afergvidanto de Akademidomaro, raportas, ke la akademidomaro en Komárno estos vendita.

Ekde la dua kunsido OProf. Wickström, la direktoro de la Subtena Sektoro, gvidas la kunvenon.

*3) Financa raporto.* OProf. Wickström prezentas la spezkalkulon kaj la bilancon pri 2006 kaj konstatas, ke la libera kapitalo de la SubS estis 6359,92 €. Li indikas kelkajn kolektivajn subtenajn membrojn, kiuj havas konsiderindajn ŝuldojn. La asembleo decidas fini la subtenan membrecon de tiuj, pri kiuj ne estas espero pri estonta pagado.

La asembleo sen kontraŭvoĉoj akceptas la spezkalkulon kaj la bilancon kaj proponas al AIS Deutschland la senŝarĝigon, se la rezulto de la reviziado estas pozitiva.

La kurzo de la AKU restu senŝanĝa (65,00 eŭroj).

*4) Decidoj pri skribaj proponoj.* Nenio decidenda.

*5) Aliaj decidoj.* La senato de AIS rekomendis al la SubS, ke ĝi subvenciu la sendadon de unu ekzistanta (aŭtoro: OProf. Kiselman), unu kreata (aŭtoro: OProf. Sachs) kaj maksimume tri ĉi-jare kreotaj kajeroj de Acta Sanmarinensia al la subtenaj membroj, krome la akiron de 20 ekzempleroj de ĉiu kajero.

Unua kajero: akceptita kontrau unu voĉo, je unu sindeteno.

Pliaj kajeroj: malakceptita, nur unu jesa voĉo, sen sindetenoj.

Estas plia propono, ke la dua kajero estu subvenciita, sed la fakturo estu pagita nur post certigo de la malnova redaktoro, ke li transdonis ĉiom de la ricevita kaj ne eldonita materialo al sia posteulo indikita de la scienc-ofico. La propono estas akceptita kontraŭ unu voĉo kaj je unu sindeteno.

La valoro de la AKU restu senŝanĝa (65 eŭroj).

*6) Elektoj.* Kiel novaj estraranoj por la periodo 2008–2011 estas elektitaj sen kontraŭvoĉoj:

- PDoc. Věra Barandovská-Frank
- Prof. Gennadij Ŝilo
- OProf. Bengt-Arne Wickström
- Reprezentanto de TAKIS
- Reprezentanto de AIS Rumanio

Kiel anstataŭantoj estas elektitaj:

- ASci. Liana Tuĥvatullina
- ASci. Friedrich Josef Dörr

Sen kontraŭvoĉoj la asembleo proponas OProf. Wickström kiel direktoron.

*7) Diversaĵoj.* La sekva kunsido okazu la inaŭguran tagon de la sekva SUS en la SUS-ejo.

Rimini, 2007-09-06
*B.-A. Wickström, kunsidestro*
*R. Fössmeier, protokolanto*